

Gerda Illerhues,

Majo

tradukita de Manfred Retzlaff

Mi vidas la sunon
sur bruna kampter',
ensorĉas la mondon
la bril' de l' aer.

Mi aŭdas la birdojn
en la foliar',
arĝente sonadas
ilia kantar'.

La florojn enmane
eksentas mi,
la glaso de l' vivo,
plenplenas ĝi.

Gustumas mi dolĉan
ĉarmecon nun kaj
mi pensas veplene:²
Ja pasos la Maj'.

*Traduko de la Germana poemo "Mai" de GERDA ILLERHUES (*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2001-05-13.*

MR-350-3 / Arg-770-1544 (2013-01-16 10:06:12)

²aŭ:
mi pensas malĝoje: